Jaro V (VII) Januaro 1912. № 1 (58)

ESPERANTYSTA POLSKI

POLA ESPERANTISTO



Krakovo. Pola nacia Muzeo „Sukiennice".

Numer 20 kop.

„Esperantysta Polski"

W ROKU 1912

będzie wychodzić regularnie co miesiąc w nieco zwiększonej objętości o rozszerzonym programie.

Roczna prenumerata z „Dodatkiem Literackim" 2 rb. 50 k. z przesyłką pocztową.

„Pola Esperantisto"

EN 912 JARO

aperados ĉiumonate en pligrandigita amplekso kun plivastigita programo kaj „Literatura Aldono"

Jar-abono kun la „Literatura Aldono" rb. 2.50=₰ 2.65 kun poŝta trasendo.

ADRESO: Warszawa, de Redakcio—Włodzimierska 8. Administr.—Hoża 20.

Jam aperis:

„ANTAŬEN KUN KREDO!"

Literatura Jarlibro de „P. E." por 1911 jaro.

La prezo de bela 200 paĝa volumo estas: **por abonantoj de „P. E". 0,50 Sm.**
„ ne-abonantoj 1,00 Sm.

mendebla en la Administracio de „P. E.", Hoża 20, Varsovio.

La enhavo: *Historiozofio de lingvo internacia* de St. A. Dobrzański; *Mia poŝhorloĝo,* novelo de M. Konopnicka, trad. Kabe; *Pax*, nov. de J. Żuławski, trad. Wł. Grabowski; *Sommo-Sierra*, fragm. el „Uragano" de Wł. Gąsiorowski, trad. D-ski, *En krepusko*, poezio de Staff, trad. Juljan Tuwim; *„La ĝemo de l'vivo"*, el „Pan Graba", de E. Orzeszkowa, trad. M. Czerwiński; *Libroj de Profetoj*, filozofiaj poemoj de A. Lange, trad. A. Grabowski; *Fabelo pri homo feliĉa*, nov. de J. Żuławski, trad. M. Czerwiński; *Nalo kaj Damayanti*, el sanskrito trad. A. Lange; *Pluvo autuna*, poemo de Staff trad. Juljan Tuwim; *En autuna vespero*, nov. de T. Konczyński, trad. E. Gacki; *Defendo de l'honoro*, nov. de Groller, trad. G. C.; *La arlekeno*, nov. de Juljusz Korczak, trad. Bejot; *Al mokantoj*, artikolo de St. A. Dobrzański.

La bela 200 paĝa volumo kun interesa kaj abunda enhavo skribita en perfekta Esperanto devas troviĝi en biblioteko de ĉiu amanto de nia lingvo kaj literaturo.

En presado: **La Nego** Kvarakta dramo de **St. Przybyszewski** (Pŝibyŝevski) trad. *T. Ficovski.* dissendota al ĉiuj abonantoj de „Pola Esper." kiel aldono por unua duonjaro de 1912 jaro.

Od Administracji „Esperantysty Polskiego".

Uprasza się pp. prenumeratorów o zawiadamianie Administracji „Esp. Pol." (Hoża 20) **o zmianie adresu**. Nieregularny odbiór pisma bywa prawie wyłącznie skutkiem niezakomunikowania **nowego adresu**.

Członkowie „Pols. Tow. Esp." (Warsz.), życzący sobie w 1912 roku otrzymywać „Esp. Pols." raczą go zaabonować w naszej Administracji (Hoża 20), lub za pośrednictwem księgarń. Prenumerata roczna wynosi 2 rb. 50 kop. wraz z „Dodat. Liter."

Ze wszelkiemi reklamacjami prosimy zwracać się tam, gdzie została opłacona prenumerata. Administracja bezpośrednio przyjmuje reklamacje tylko od tych pp. prenumeratorów, którzy nadesłali swe zamówienia i prenumeratę wprost do Adm. „Esp. Pols."

Co to jest Esperanto?

Esperanto jest to język sztuczny, genjalnie rozwiązujący odwieczny problemat Języka Międzynarodowego.

Esperanto jest to język dźwięczny, giętki, logiczny i nader bogaty.

Esperanto zdolny jest wyrazić każde pojęcie i najsubtelniejsze odcienie myśli ludzkiej.

Esperanto jest neutralnym środkiem komunikacji umysłowej dla całej ludzkości.

Esperanto nie ma na celu wyrugowania języków narodowych, lecz ma służyć obok języka ojczystego jako środek pomocniczy w stosunkach międzynarodowych.

Esperanto należy do największych zdobyczy kulturalnych 19 stulecia i ma olbrzymią przyszłość przed sobą.

Esperanto jest dziełem polskiego lekarza D-ra Ludwika Zamenhofa.

Esperanto, jako powstały na ziemi polskiej, przyczynia się do sławy imienia polskiego.

Esperanto daje równouprawnienie językowe w stosunkach z narodami uprzywilejowanymi.

Esperanto usuwa przeszkody w obcowaniu z ludźmi, wynikające z różnojęzyczności.

Esperanto ma gramatykę niesłychanie prostą i łatwą — bez żadnych wyjątków.

Esperanto posiada słownik, składający się tylko z paru tysięcy najbardziej międzynarodowych pierwiastków; każdy inteligientny człowiek zna ich do 50% bez nauki (absolut'a, kultur'o, tendenc'o, aprob'i i t. p.).

Esperanto posiada niezliczoną ilość słów pochodnych, które się tworzą zapomocą 32 sufiksów i prefiksów oraz końcówek gramatycznych.

Esperanto znakomicie nadaje się nietylko do mowy potocznej i korespondencji, lecz i do wszelkiego rodzaju dzieł naukowych i literackich, nie wyłączając poezji.

Esperanto dzięki swemu bogactwu, giętkości i logicznej budowie, doskonale nadaje się do tłómaczeń z każdego języka bez zmiany i spaczenia myśli.

Esperanto nie jest językiem martwym, ponieważ ulega naturalnemu rozwojowi,— nie dowolnie jednak, lecz prawidłowo i logicznie, zgodnie z zasadami swej budowy.

Esperanto dzięki swym wyjątkowym zaletom zyskał na całym świecie powszechne uznanie. Instytucje naukowe, znakomici uczeni i myśliciele wypowiedzieli o nim najpochlebniejsze opinje

Esperanto ułatwia naukę innych języków i przyzwyczaja do analizy językowej i syntezy.

Esperanto obecnie jest już rozpowszechniony o tyle, że niema kraju i miasta, gdzieby nie było esperantystów.

Esperanto szczególniejszym uznaniem cieszy się w najkulturalniejszych krajach, bo — Francji, Anglji, Niemczech i Ameryce.

Esperanto już obecnie daje doraźną korzyść, umożliwiając stosunki z całym światem.

Esperancki tekst można czytać przy pomocy słownika nawet bez znajomości gramatyki; w żadnym innym języku jest to niemożliwe.

Esperanto nadaje się do prowadzenia korespondencji z ludźmi, nieznającymi tego języka; należy tylko do listu dołączyć „Klucz Esperanto“ Cefeča (waży ½ łuta i kosztuje 5 groszy).

Esperanto usunie z czasem potrzebę nauki obcych języków, na co teraz w szkołach nieprodukcyjnie marnuje się tyle czasu i sił; zyskany zaś czas można będzie poświęcić nauce języka ojczystego oraz innych przedmiotów, wzbogacających umysł i wiedzę.

Esperanto ułatwi korzystanie z dzieł naukowych i literackich całego świata, gdyż każde dzieło wybitne wystarczy przetłómaczyć tylko na Esperanto, aby uprzystępnić je dla wszystkich narodów.

Esperanto stale i coraz więcej rozpowszechnia się, jak to dowodzą następujące dane:

Esperanckich t o w a r z y s t w oficjalna statystyka podaje: w r. 1905 — *108*, 1905 — *523*, 1908 — *1575*, 1910 — *1719*.[1])

Esperanckich c z a s o p i s m wydawano w r. 1905 — *22*, 1906 — *58*, 1909 — *89*, 1911 — z górą *100*.

Esperancka l i t e r a t u r a w r. 1910 liczyła około 2000 tomów dzieł tłómaczonych i oryginalnych.

[1]) Z nich „Francuzka liga“ liczyła w 1909 r. 8766 członków, a „Esperancki Wszechświatowy Związek“ („U. E. A.“) z Zarządem w Genewie w tymże roku liczył 7500 członków i posiadał w 872 miastach 44 krajów 618 swych konsulów, 765 delegatów i 296 subdelegatów.

Uczmy się Esperanta!

Kompletna gramatyka języka Esperanto.

a) Alfabet.

Aa,	Bb,	Cc,	Ĉĉ,	Dd,	Ee,
a	b	c	cz	d	e
Ff,	Gh,	Ĝĝ,	Hh,	Ĥĥ,	Ii,
f	g	dż	h	ch	i
Jj,	Ĵĵ,	Kk,	Ll,	Mm,	Nn,
j	ż	k	l	m	n
Oo,	Pp,	Rr,	Ss,	Ŝŝ,	Tt,
o	p	r	s	sz	t
Uu,	Ŭŭ,	Vv,	Zz.		
u	u (krótkie)	w	z		

b) Części mowy.

1) Przedimek jest tylko określny: la, wspólny dla wszystkich rodzajów, przypadków i liczb; nieokreślonego niema.

Przykłady: la *homo* człowiek, la *stelo* gwiazda, la *maro* morze, la *libro* książka.

2) Rzeczownik kończy się zawsze na o.

Dla utworzenia liczby mnogiej dodaje się końcówka j.

Przykłady: *homoj* ludzie, *stelo*j gwiazdy, *maro*j morza.

Przypadków jest dwa: mianownik (przypadek pierwszy, nominativus) i biernik (przypadek czwarty, accusativus); ten drugi powstaje z mianownika przez dodanie zakończenia n.

Resztę przypadków oddaje się za pomocą przyimków: *de* (od), *al* (do), *kun* (z), *per* (przez), lub innych przyimków, odpowiednio do znaczenia.

Przykłady: *patro* ojciec, *al patro* ojcu, *patron* ojca (biernik liczby pojedyńczej), *por patroj* dla ojców, *patrojn* ojców (biernik liczby mnogiej).

3) Przymiotnik kończy się zawsze na a.

Przykłady: *kara patro* drogi ojciec, *kara patrino* droga matka, *kara infano* drogie dziecię.

Przypadki i liczby są te same, co dla rzeczownika.

Przykłady: *bona*n *patro*n dobrego ojca; *juna*n *patrino*n młodą matkę (bierniki liczby pojedyńczej), *kela*j *homo*j światli ludzie, *hela*j *stelo*j jasne gwiazdy (mianowniki liczby mnogiej), *vi vidis bela*jn *teatro*jn widzieliście piękne teatry (biernik liczby mnogiej).

Stopień wyższy tworzy się przez dodanie wyrazu pli (więcej), a najwyższy przez dodanie plej (najwięcej); wyraz niż tłomaczy się przez ol.

Przykłady: *Pli blanka ol nego* bielszy niż śnieg, *plej pura ak'o* najczystsza woda.

4) Liczebniki główne nie odmieniają się: *unu* (1), *du* (2), *tri* (3), *kvar* (4), *kvin* (5), *ses* (6), *sep* (7), *ok* (8), *naŭ* (9), *dek* (10), *cent* (100), *mil* (1000). Dziesiątki i setki tworzą się przez proste połączenie liczebników.

Dla utworzenia liczebników porządkowych dodaje się końcówka przymiotnika. Np. *unua* pierwszy, *dua* drugi i t. d.

Dla wielorakich — przyrostek obl; *trioblo* potrójny.

Dla ułamkowych — on; *duono* połowa, *kvarono* ćwierć.

Dla zbiorowych — op; *kvarope* we czworo.

Dla podziałowych — wyraz po; *po kvin* po pięć.

Prócz tego mogą być liczebniki rzeczowne (*unuo* jedynka, *duo* dwójka, *cento* setka) i przysłówkowe (*unue* po pierwsze, *duo* powtóre i t. d.).

Przykłady: *Kvincent tridek tri* (533), *du mil kvarcent sesdek du* (2462).

5) Zaimki osobiste: *mi* ja, *ci* ty, *li* on, *ŝi* onna, *gi* ono (o rzeczy lub zwierzęciu — używa się tylko w liczbie pojedyńczej); *ni* my, *vi* wy (ty), *si* siebie, *ili* oni, one, *oni* zaimek nieosobisty liczby mnogiej.

Zaimki dzierżawcze tworzą się przez dodanie końcówki przymiotnika.

Przykłady: *mia* mój, moja, moje, *via* wasz, wasza, wasze.

Zaimki odmieniają się, jak rzeczowniki.

Przykłady: *min* mnie (biernik liczby pojedyńczej), *miaj* moi, moje (mianownik liczby mnogiej), *siajn* swoich (biernik liczby mnogiej).

6) Czasownik nie odmienia się przez osoby i liczby. (Np. *mi faras* ja czynię, *la patro faras* ojciec czyni, *ili faras* oni czynią).

Formy czasownika (końcówki:

a) Tryb bezokoliczny ma zakończenie i (*fari* czynić).

b) Czas teraźniejszy — as (np. *mi faras* ja czynię).

c) Czas przeszły — is (*li faris* on czynił).

d) Czas przyszły — os (*ili faros* oni uczynią).

e) Tryb warunkowy — us (*ŝi farus* ona uczyniłaby).

f) Tryb rozkazujący — u (*faru* czyń, czyńcie).

Imiesłowy (odmienne i nieodmienne).

a) Imiesłów czynny czasu teraźniejszego — ant (*faranta* czyniący, *farante* czyniąc).

b) Imiesłów czynny czasu przeszłego — int (*farinta* który uczynił).

c) Imiesłów czynny czasu przyszłego — ont (*faronta* który uczyni).

d) Imiesłów bierny czasu teraźniejszego — at (*farata* czyniony).

e) Imiesłów bierny czasu przeszłego — it (*farita* uczyniony).

f) Imiesłów bierny czasu przyszłego — ot (*farota* mający być uczyniony).

Wszystkie formy strony biernej tworzą się za pomocą odpowiedniej formy słowa *esti* (być i imiesłowu biernego danego słowa; używa się przytem przyimka *de* (np. *ŝi estas amata de ĉiuj* — ona jest kochana przez wszystkich).

7) Przysłówki mają zakończenie e.

Stopniowanie podobne jest do stopniowania przymiotników (np. *mia frato* pli *bone kantas ol mi* mój brat lepiej śpiewa niż ja).

8) Przyimki (*de*, *al*, *per*, *kun* i t. d.) rządzą wszystkie przypadkiem pierwszym.

c) Prawidła ogólne.

9) Każdy wyraz czyta się tak jak się pisze.

10) Akcent pada zawsze na przedostatnią zgłoskę.

11) Wyrazy złożone tworzą się przez proste połączenie wyrazów (główny na końcu). Końcówki gramatyczne uważane są za wyrazy samoistne (np. *vaporŝipo* parostatek — z *vapor'* para, *ŝip'* okręt, *o* końcówka rzeczownika).

12) Przy innym przeczącym wyrazie opuszcza się przysłówek przeczący *ne* (np. *mi neniam vidis* — nigdy nie widziałem).

13) Na pytanie dokąd wyrazy przybierają końcówkę biernika, np. *tie* tam (w tamtem miejscu), *tien* tam (do tamtego miejsca) *Varsovio*n do Warszawy.

14) Każdy przyimek ma określone, stałe znaczenie; jeżeli należy użyć przyimka w wypadkach, gdzie wybór jego nie wypływa z natury rzeczy, używany bywa przyimek je, który nie ma samo-

En Ago — venko nia!

POLA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por propagando de Esperanto


ESPERANTYSTA POLSKI

Miesięcznik poświęcony sprawie Języka Międzynarodowego

Januaro 1912 | WARSZAWA—VARSOVIO. | Jaro VII — Nro 1 (58)

La Prezidanto de la Oka.

Profesoro *Odo Bujwid*, nuna prezidanto de Krakova E. Societo kaj novelektita prezidanto de la VIII-a Kongreso, naskiĝis en Vilno en 1857 j.; gimnazion kaj poste medicinan fakultaton li finis en Varsovio. Jam la unuaj laboroj turnis atenton de la pola scienca mondo sur la junan, talentan scienciston. Por laboro „Ĥemio de homa salivo" (1882 j.) li ricevis arĝentan medalon kaj por verko „Mikroskopa esplorado de salivo" — la oran. Prof. Bujwid studis bakteriologion ĉe fama Koĥ en Berlino kaj ĉe Pasteur en Parizo. Reveninte el eksterlando li aranĝis bakteriologian laborejon en Varsovio kaj en 1890 li fondis urban-esplorstacion de manĝ-artikoloj kaj instituton de inokulo de kontraŭrabia serumo. En la jaro 1895 prof. Bujwid estis elektita urba konsilanto de Krakovo kaj en la 1897—membro de scienca konsilantaro ĉe ministerio de internaj aferoj en Wien. Liaj laboroj koncernas precipe bakteriologion.



Profes. Odo Bujwid.

Kun ĝojo oni povas aplaŭdi la organizantojn de la loka kongresa komitato pro la feliĉa elekto de prof. Bujwid, al kiu ili konfidis gravan taskon de la prezidanto. Ni kredas, ke la Kongreso, kies aranĝon surprenis energiaj krakovanoj, gvidatej de profesoro Odo Bujwid, konvene solenos la grandan internacian feston de 25-jara jubileo de Esperanto.

Nin atentos, rigardos kaj taksos okuloj ne nur detutmonda samideanaro, sed ankaŭ de poloj neesperantistoj, dubemuloj aŭ indiferentuloj. Ke la impreso estu plej bona kaj memorinda, tio plejparte dependas de la organiza komitato, al kies prezidanto, prof. Bujwid, ni tutkore deziras esperatan sukceson.

Al niaj legantoj.

Tiu — ĉi numero estas dissendata al ĉiuj niaj pasintjaraj abonantoj; la sekvontajn n-rojn ricevos nur re-abonantoj.

Al niaj legantoj.

Jen ni ekstaris sur la kvina etapo de nia longa, en estontecon kondukanta vojo. Ni ne iris solaj. Sekvis nin granda kaj entuziasma aro da samideanoj, kiuj kredis al nia komuna celo, kiuj kredis, ke nia vojo estas aukaŭ la vojo ilia. Ili kun ni esperis kaj kun ni ĝojis pro la sukcesoj. Nin kondukis la sama Stelo de L' Espero...

Etendante al ili amikaju manojn ni diras tutkore: „Dankon, samideanoj!"

Kun la sama kiel antaŭe kredo ni enpaŝas en la kvinan jaron de eldonado, ne dubante, ke niaj amikoj sekvos nin plu, en konfido, ke ni *kune* laboros por nia sankta, kara afero.

Ĉar vi estis por ni bondezirantaj kaj amikaj— ni volas laŭpove rekompenci vin: „Pola Esperantisto" aperos de nun en vesto pli bela, pli ornamita! La ilustrajoj, kaj pli bela papero estas nia unua paŝo por plaĉi al vi ekstere; plibeligo de internajo de nia gazeto dependas ankaŭ de vi mem, ĉiuokaze ĝi neniel estos malplibona ol en antaŭa jaro. Suprenomitaj ŝanĝoj, kaj ankaŭ uniformigo de la presliteroj kaj ŝanĝo de kompostistoj—kaŭzis ioman malfruiĝon de januara N-ro, kion vi bonvolu amike pardoni al ni.*)

Ĉar „En Ago venko nia!", do—„Antaŭen kun kredo!"

La Redakcio.

*) Eĉ, se vi estas samideanoj el Łódź aŭ Kraków)...

Nienawiść plemienna.

(Według referatu d-ra L. L. Zamenhofa, wygłoszonego na kongresie ras w Londynie.)

Na niedawno odbytym w Londynie kongresie ras między dwoma znakomitymi referatami, wygłoszonymi przez przedstawicieli wszystkich ras i ludów — zwrócił powszechną uwagę i wywołał żywą dyskusję referat twórcy Esperanta, d-ra L. L. Zamenhofa. Z referatu tego cytujemy niektóre idee, rzucające światło na właściwe przyczyny nienawiści międzyrasowej.

„Wzajemne zwalczanie się ras i plemion jest największem nieszczęściem ludzkości. A co jest główną, może nawet jedyną przyczyną nienawiści między plemionami? Czy polityczne warunki, to jest konkurencja między tymi grupami ludzkiemi, które nazywamy państwami?

Nie. Wszak jest wiadomem, że naprzykład Niemiec państwa niemieckiego nie czuje wrodzonej nienawiści do Niemca w Austrji; Niemcy urodzeni i mieszkający w najrozmaitszych państwach czują dla siebie wzajemną sympatję, gdy naprzykład Niemcy i Słowianie, urodzeni w tem samem państwie, uważają się wzajemnie za obcych i — jeżeli poczucie wszechludzkie nie przewyższa w nich egoizmu — wzajemnie się nienawidzą i zwalczają. A więc nie egzystencja państw wytwarza plemienną i międzyplemienną nienawiść.

Czy ją wytwarza konkurencja ekonomiczna?

Nie. Często rzeczywiście słyszymy okrzyk: Niebezpieczeństwo! to lub owo plemię połknie nas ekonomicznie! uciskajmy je, walczmy przeciw niemu!

Lecz każdy człowiek, którego szowinizm nie zaślepił, łatwo może pojąć, że takie krzyki są zupełnie bezsensowe, że my nienawidzimy obce plemiona nie z obawy, że one nas ekonomicznie połkną, lecz, że dlatego krzyczymy o połknięciu, ponieważ je nienawidzimy. Bo jeżeliby rzeczywiście ekonomiczna obawa była przyczyną naszej nienawiści, tedy musielibyśmy w każdym kraju, we wszystkich prowincjach i miastach tak samo nienawidzić się wzajemnie i zwalczać. Czy rzeczywiście z ekonomicznych pobudek nienawidzą np. miljony rosyjskich biedaków miljony biedaków chińskich, i dlatego tak chętnie przelewają krew w obronie swych gnębicieli przeciw obcym? Więc nie przyczyny ekonomiczne wytwarzają międzyplemienną nienawiść.

Czy ją wytwarza odległość, różnica geograficznych, klimatycznych lub innych warunków, które wywołują jakąś naturalną niechęć i antypatję między plemionami?

Nie. Odległość i różnica lokalnych, klimatycznych warunków rzeczywiście powoduje niejaką różnicę zewnętrzną i różnicę charakteru ludzi, ale nie wywołuje plemiennej i międzyplemiennej nienawiści. Gieograficzna i lokalna różnica naprzykład między mieszk-

kańcem Petersburga i Odesy, Kijowa i Krasnojarska jest bezporównania daleko większa, niżeli naprzykład między berlińczykiem a warszawiakiem, a jednak między pierwszymi istnieje współczucie współplemieńcze i bratnie, a między ostatnimi uczucie wzajemnej obcości i najfanatyczniejszej nienawiści.

Czy tę nienawiść stwarza fakt, że różne rasy i plemiona odróżniają się między sobą własnościami ciała?

Nie. Pośród każdego plemienia znajdujemy ludzi najrozmaitszego koloru skóry, najrozmaitszej wielkości dla form ciała i części tegoż; częstonawet dwie osoby tego samego plemienia różnią się więcej cieleśnie, niżeli przeciętny japończyk od francuza; a jednak nikomu nigdy nie przyjdzie do głowy dzielić członków jednego n rodu na oddzielne grupy według kształtu ciała i przypuszczać, że takie grupy muszą się wzajemnie nienawidzić i zwalczać.

Uczucie białego względem czarnego—owo uczucie, które nam się wydaje pewną antypatją — jest w rzeczywistości zupełnie takiem samem, jak uczucie dziedzicznego arystokraty z pochodzenia, względem nieokrzesanego chłopa, który jest nieprzyjemnym dla niego z powodu głównie braku inteligiencji i nieeleganckiego zachowania się.

Czy ją stwarza różnica umysłowa?

Nie. Mózgi i serca ludzkie są co do swych funkcji zupełnie równe; jeżeli tak często widzimy różnicę umysłową, to jest to nie właściwość rasowa, lecz właściwość indywidualna, lub zależy jedynie od okoliczności, w których dane indywiduum lub rasa żyje. Jeżeli widzimy dużą różnicę między umysłowością jakiegokolwiek afrykańskiego szczepu a umysłowością któregokolwiek europejskiego narodu, to przyczyną nie jest różnica rasowych własności, lecz różnica wywołana cywilizacją lub politycznem położeniem. Dajcie Afrykańczykom, bez ucisku i nienawiści, wysoką ludzką cywilizację, a wtedy umysłowość ich nie będzie się różniła od naszej. Pozbawcie nas naszej cywilizacji, a wtedy nie będą się różniły nasze umysły od umysłów afrykańskich ludożerców.

A więc mamy tu do czynienia nie z różnicą plemienną umysłowości, lecz różnicą oświaty, którą w większch lub mniejszych rozmiarach obserwować możemy między klasami lub rozmaitymi historycznymi epokami tego samego narodu.

Czy ją stwarza różnica pochodzenia?

Rzeczywiście, w pierwszej chwili zdaje się, że to jest najważniejszą przyczyną międzyplemiennej nienawiści. Wiemy, że każdy z nas kocha swoją krew, że każdy z nas więcej kocha swego brata lub krewnego, niż obcego. Wewnętrzna łączność i zewnętrzne oddzielanie się familji przedstawia prototyp wzajemnego stosunku między plemionami i rasami, które z powodu przypuszczalnego wspólnego pochodzenia przedstawiają się więcej niż familje w szerszym zakresie. A jednak mimo, że jednoplemieńcy nazywają się „przedstawicielami jednej krwi“ i „braćmi“, jest bardzo łatwo dowieść, że analogja między familjami i plemionami i ważność pochodzenia dla stosunków międzyplemiennych jest tylko pozorna. Krewni wiedzą, że mieli tych samych rodziców lub dziadów; jednoplemieńcy analogicznie wierzą, że przed wieloma stuleciami lub tysiącleciami zrodzili ich ci sami pra-pradziadowie; lecz ta wiara jest to tylko przypuszczenie, które opiera się wyłącznie na tożsamości języka i religji, a w większości wypadków jest zupełnie mylne.

Z powodu ciągłego mieszania się narodów nikt (prócz dziedzicznych kast) obecnie nie może wiedzieć, do jakiego plemienia należał jego praszczur. Nietylko nje da się dowieść, że każdy współczesny mieszkaniec ziemi należy do tego samego plemienia, do jakiego należeli jego dalecy pradziadowie, lecz przeciwnie: z tych osobników, którzy znają swoje pochodzenie (prócz kast religijnych),większość z całą pewnością wie, że ich pradziadowie należeli nie do tego samego plemienia, do którego oni sami się teraz zaliczają. A jednak, czy ktokolwiek może powiedzieć, że naprzykład wielcy rosyjscy pisarze Karamzin, Puszkin lub Lermontow nie byli rzeczywistymi, jak najrzeczywistszymi Rosjanami, chociaż ich pradziadowie nie byli Rosjanie?

Co więc jest rzeczywistą przyczyną międzyplemiennej rozbieżności i nienawiści?

Z wszystkiego, co wykazałem, można już widzieć, że pomimo wszystkich, jakoby naukowych teorji o rasowych odrębnościach, klimacie, dziedzicznej krwi i t. d. rzeczywistym murem między plemionami, rzeczywistą przyczyną każdej plemiennej nienawiści, jest jedynie różnica języków i religji.

Przedewszystkiem język gra tak olbrzymią i prawie wyłączną rolę w odróżnianiu plemion, że w kilku językach wyraz język i plemię są zupełnymi synonimami.

C. d. n.

BOLESŁAW PRUS.

Pekoj de l' infaneco.

Mi naskiĝis en epoko, kiam ĉiu homo devis havi alnomon, eble eĉ ne tute ĝustan.

Tiakaŭze nian bienposedantinon oni nomis grafino, mian patron Ŝia plenrajtigito, kaj min tre malofte Kazjo aŭ Lesniewski, sed sufiĉe ofte — petolulo, kiam mi estis ankoraŭ hejme, aŭ — azeno, kiam mi estis jam sendita en lernejon.

Ĉar oni vane serĉus la nomon de nia bienposedantino en la almanako de aristokratiaj familioj, do Ŝajnas al mi, ke la brilo de Ŝia grafa krono ne etendiĝis pli malproksimen, ol la plenrajtigiteco de mia sankt-memorata patro. Mi eĉ rememoras, ke la titolo de grafino estis kvazaŭ monumento, per kiu mia s. m. patro honorigis la ĝojan okazon, kiam lia salajro estis pligrandigita jare je 100 polaj florenoj **) Nia sinjorino silente akceptis la oferitan al Ŝi dignon, kaj post kelke da tagoj mia patro antaŭeniĝis, fariĝante ĉe bienestro — plenrajtigito, kaj li ricevis anstataŭ diplomo, grandegan porkidon, post kies vendo oni aĉetis al mi la unuajn botojn.

La patro, mi kaj mia fratino Zonjo (ĉar patrinon mi jam ne havis), ni loĝis en masonita oficejo, kelkdek paŝojn for de l' palaco. La palacon okupis la sinjorino grafino kun la filineto Lonjo, mia samaĝulino, kun ĝia guvernistino, kun la maljuna mastrino Salomeo, kaj kun granda nombro da ĉambristinoj kaj servantaj fraŭlinoj. Tiuj junulinoj kudris dum tutaj tagoj, pro kio mi konkludis, ke la grandsinjorinoj ekzistas tial, por ĉifonigi la vestajojn, kaj la junulinoj — por ilin ripari. Pri aliaj destinoj de grand-sinjorinoj kaj malriĉaj knabinoj mi sciis nenion, kaj tio estis, laŭ opinio de mia patro, mia sola bona eco.

La sinjorino grafino estis juna vidvino, kiun la edzo sufiĉe frue nekonsoleble malĝojigis. Kiom mi scias el la tradicio, la formortinton neniu titolis grafo, nek li nomis iun plenrajtigito. Anstataŭe, la najbaroj, kun stranga en nia lando unuanimeco, nomis lin frenezetulo. Sendube li estis homo neordinara. Li mortlacigis selĉevalojn, hufpremis dum ĉasado semajojn de vilaĝanoj, kaj kun la najbaroj li duelis pro ĉevaloj kaj hundoj. Hejme li turmentis la edzinon per ĵaluzo, kaj al la servistaro li maldolĉigis la vivon per longa, pipro-

*) 15 spesmiloj.

ligna piptubo. Post la morto de la strangulo liaj selĉevaloj devis veturigi sterkon, kaj la hundojn oni disdonacis. La mondo ricevis post li herede malgrandan filineton kaj junan vidvinon. Ah! pardonu, ĉar restis ankoraŭ olekolora portreto de la mortinto, kun blazona sigelringo sur fingro, kaj — tiu piproligna piptubo, kiu, sekve de malĝusta uzado, kurbiĝis kiel turka sabro.

La palacon mi preskaŭ ne konis. Unue, ĉar mi preferis kuri sur la kampoj, ol renversiĝi sur glata pargeto, kaj due tial, ke min ne enlasis la servistaro, ĉar dum la unua vizito mi havis la malfeliĉon rompi grandan saksan florvazon.

Kun la grafidino, antaŭ mia foriro en lernejon, ni ludis nur unufojon, havante ambaŭ neplene po dek jarojn. Okaze mi volis lernigi al Ŝi la arton de grimpado sur arboj kaj mi sidigis Ŝin sur la latbarilon tiamaniere, ke la knabineto komencis krii tutgorĝe, pro kio Ŝia guvernistino punbatis min per blua ombrelo dirante, ke mi povis malfeliĉigi Lonjon por la tuta vivo.

De post tiu tempo vekiĝis en mi antipatio al malgrandaj knabinoj, el kiuj neniu scipovis grimpi sur arboj, nek baniĝi kun mi en la lageto, nek rajdi, nek arkpafi, nek uzi ŝtonjetilon. Okaze de batalo, sen kiu — kia estus amuzo! preskaŭ ĉiu knabineto komencis plori kaj kuris al iu plendi.

Ĉar kun bienlaboristaj knaboj la patro malpermesis al mi komunikiĝi, kaj ĉar mia fratino pasigis preskaŭ tutajn tagojn en la palaco, do mi kreskis kaj edukiĝis mem, kiel rabobirdido, kiun forlasis la gepatroj. Mi baniĝis sub la muelilo, aŭ, en truhava boato, mi naĝis sur la lageto. En la parko, kun facilmoveco de kat., mi postkuris sur la brancoj la sciurojn. Foje, renversiĝis mia boato kaj duontagon mi sidis sur la naĝanta insuleto, ne pli granda ol lavujo. Foje, tra la fumujo mi grimpis sur tegmenton tiel malfeliĉe, ke oni devis kunligi du ŝtupetarojn, por venigi min el tie. Alifoje tutan plentagon mi eraris en la arbaro, kaj ankoraŭ alifoje la maljuna rajdĉevalo de la formortinta sinjoro, rememoriginte al si pli bonajn tempojn, preskaŭ tuthoron portis min galope tra la kampoj, kaj fine — verŝajne malgraŭvole — kaŭzis rompon de mia kruro, kiu cetere baldaŭ ree kunkreskis.

Ne havante iun por kunvivo, mi vivis kun la naturo. Mi konis en la parko ĉiun formikaron, en la kampo ĉiun kavernon de hamstroj, en la ĝardeno ĉiun talpovojeton. Mi sciis pri la birdonestoj kaj pri la arbokavajoj, kie loĝis la sciuridoj. Mi diferencigis la bruon de ĉiu tilio ĉirkaŭ la domo kaj sciis kanti tion, kion la vento ludas en la arboj. Iafoje mi aŭdis en la arbaro ian eternan iradon, kvankam mi ne sciis, kies ĝi estas? Mi rigardis la flagretadon de steloj, mi interparolis kun la nokta silento, kaj ne havante iun por kisado, mi kisis la korthundojn. Mia patrino jam delonge ripozis en la tero. Jam sub la premanta ŝin ŝtono eĉ fariĝis malfermajo, atinganta kredeble la internajon de la tombo. Foje, punbatite pro io, mi iris tien, alvokadis ŝin, almetadis la orelon, por aŭdi, ĉu ŝi ne respondos. Sed ŝi respondis nenion. Evidente ŝi mortis efektive.

En tiu tempo mi formis al mi la unuajn ideojn pri homoj kaj pri iliaj interrilatoj. En mia imago, ekzemple, la plenrajtigito devis nepre esti iom korpulenta, havi brunruĝan vizaĝon, pendantajn malsupren lipharojn, grandajn brovojn super grizaj okuloj, basan voĉon kaj almenaŭ tian kapablon al kriado — kiel mia patro. La personon, nomatan grafino, mi ne povis imagi al mi alie, ol kiel altkreskan sinjorinon, kun bela vizaĝo kaj malgajaj okuloj iradantan silente tra la parko, en blanka, treniĝanta robo.

Pri homo, titolata grafo, mi havis nenian ideon. Simila homo, eĉ se li ekzistus, ŝajnis al mi ajo pli malmulte signifanta ol la grafino, aŭ eĉ tute senutila kaj maldeca. Laŭ mia opinio, nur en vasta robo, kun longa trenajo, povis loĝadi la majesto de ekscelenca moŝto; kontraŭe, ĉiuj vestajoj mallongaj, malvastaj kaj despli la konsistantaj el du partoj, povis servi nur al bienskribistoj, brandfaristoj, kaj, eĉ al rajtigitoj.

Tia estis mia legitimismo, apogita sur la ordonoj de mia patro, kiu senĉese rekomendis al mi — ami kaj honori la sinjorinon grafnon. Cetere, se mi iam forgesus tiujn regulojn, mi bezonis nur rigardi la ĉerizkoloran ŝrankon en la kancelario de mia patro, kie, apud kvitancoj kaj notajoj, pendis sur najlo la kvinpinta disciplino *), tiu enkorpiĝo de principoj de socia ordo.

Ĝi estis por mi speco de enciklopedio, kiun rigardante, mi rememoris al mi, ke oni ne devas detrui botojn, tiri bovidojn je l' vosto, ke ĉiu povo devenas de Dio, k. t. p.

*) skurĝo.

Mia patro estis homo nelacigeble laborema, senmakule honesta, kaj eĉ tre malsevera. El vilaĝanoj kaj servistoj li tuŝis neniun per fingro, nur li kriegis terure. Sed se li estis iom severa por mi, tio ne okazis sen pravaj motivoj. Nia orgenisto, al kiu mi foje enŝutis en la tabakujon iometon da veratro, sekve de kio, dum la tuta sankta meso li ternis, anstataŭ kanti, kaj senĉese eraris en la ludado, — diris ofte, ke, se li havus tian filon kiel mi, li pafus en lian kapon.

La sinjorinon grafinon la patro nomis anĝelo de boneco. Efektive: en ŝia bieno ne ekzistis homoj malsataj, nek ĉifonvestitaj, nek suferantaj maljuston. Ĉiu, al kiu oni faris malbonon, iris plendi al ŝi; kiu estis malsana, prenis kuracilon el la palaco; al kiu naskiĝis infano, petis la sinjorinon, ke ŝi estu baptanino. Mia fratino lernis kune kun la grafidino, kaj mi mem, kvankam mi evitis aristokratiajn rilatojn, havis tamen okazon konvinkiĝi pri la eksterordinara mildeco de la grafino.

Mia patro posedis kelkajn ekzemplerojn da armiloj, el kiuj ĉiu estis destinita por alia celo. La grandega dutuba pafilo devis servi por mortigado de lupoj, kiuj sufokadis la bovidojn de nia bienheredantino; la fajroŝtona pistolo devis esti uzata por defendo de ĉiu alia proprajo de la grafino, kaj la militista palaŝo*) por defendo de ŝia honoro. Sian proprajon kaj honoron la patro verŝajne defendus per civila bastono, ĉar la tuta batala armilaro, ĉiukelkmonate ŝmirata per graso, kuŝis ie en tia angulo, sub la tegmento, ke eĉ mi ne povis ĝin trovi.

Tamen mi sciis pri tiuj armiloj kaj mi tre sopiris al ili. Iafoje mi revis, ke mi plenumis tiel noblan faron, pro kiu la patro permesis al mi pafi el la grandega pistolo, kaj dume— mi kuris sekrete al la arbaristoj kaj lernis pafi el la longaj unutubaj pafiloj, kiuj posedis tian econ, ke ĉe la pafo ili faris senperan malutilon nur al miaj makzeloj, ne tuŝante ian kreajon.

Iutage, dum la oleumado de la dutuba pafilo, destinita kontraŭ lupoj, de la pistolo, por defendo de proprajo, kaj de la palaŝo, por defendo de la grafina honoro, mi prosperis ŝteli de l' patro plenmanon da pulvo, kiu, kiel mi scias, ne havis ankoraŭ specialan destinon. Kiam la patro forveturis en la kamparon, mi kaptis grandegan grenejan ŝlosilon, kiu havis malfermon similan al tubo, krom tio flankan truon, kaj mi ekiris ĉasi.

*) pola sabro. Trad. **Ant. Grabowski.**

P O E Z I O.

Magia nokto.

Magia nokt'. Arkajo de l' ĉielo
Rigardas teron per stelara bril'.
Jam kovris teron nigra nokt-mantelo,
Angel' de nokto svingis per flugil'.

Magia nokt'. Stel-brila firmamento
Ekpendis super mondo en mister'
Kaj dormas kiel Reĝo de l' Silento,
Kaj spiras sur vizaĝon de la ter'.

Magia nokt'. En la etero lumas
Safira bril' de la eterna am'
Kaj en ĉiel' smeraldoj palpebrumas,
Kaj diamantoj brulas, kiel flam'.

Magia nokt'. El altaj, altaj sferoj,
Sur min sin verŝas maro de Belec',
La penson ĉirkaŭprenas la misteroj
De la neatingebla senfinec'.

Magia nokt'. Sopiro iluzia
En koro ploras re' kun mia sent',
Sub la rigard' de l' nokt' de l' nokt' magia,
Sub la flugil' de l' nigra firmament'.

Magia nokt'. En brust' malĝoja mia
Lamentas re' sufero kaj turment',
Sub la ĉiel' de l' nokt' de l' nokt' magia,
Sub la mantel' de l' nigra firmament'.

Łódź. Orig. verkis **B. Mirski.**

Ĉarmoj de la nokto.

La lunradioj per bril' arĝenta
Dormantajn kampojn trairas...
Mi revoplena staras silenta
Kaj ĉarman nokton admiras...

Misteraj steloj flagretas ore
Sur firmamento malhela..
Aŭdiĝas kanto... ĝin kantas hore
La or-stelaro ĉiela.

Ho, kanto dolĉa! kanto mistera,
Ĉiela kanto serena!
Malsuprenflugu al globo tera,
Sekigu larmojn — kant' bena!

Eniru ĉiujn homajn kabanojn,
En kiuj regas doloro,
Kaj kvietigu terajn infanojn,
Ke eksilentu la ploro!..

Ravigu ilin per son' magia,
Ho, nokta kanto sorĉtona,
Forgesu ĉiuj pri zorgo sia
Kaj pri la sorto malbona!

. . . . . .

La luno revas... kantas stel-koro
Pri noktaj miroj kaj ĉarmoj...
Sur tero plue regas doloro...
Kaj plue... fluas la larmoj..

Kraków. Orig. verkis **Juljusz Kriss.**

Kanto de Solvejg.

El „Peer Gynt" de H. IBSEN. Muziko de E. GRIEG.

Forpasos la vintro,
Printempa brilos sun',
Kaj mortos somero,
Vent-ĝemos la aŭtun'...

Sed li iam venos—
Diras kor' al mi',
Kun sopir' atendi —
Juris mi al li

En mond' vin konduku
Kaj gardu Dia bon',
Favoru vin Dio,
Se vi ĉe Lia tron'!

Mi sopir-atendos —
Ĝis revenos vi;
Se vi en ĉielo —
Tien venos mi...

Laŭvorte esperantigis **H. Bonnevie.**
(Kristiania)

Retradukis kaj kantebligis **M. Cz.**

Prof. MARCEL FINOT.

La ĉielo.*)

El la homoj, almenaŭ el tiuj, kiuj rezonas kaj kelkafoje estas movataj de scivolemo, malmultaj estas, kiuj sin demandas, kun kuriozeco maltrankvila, kio estas la ĉielo, kiu ĉirkaŭas nian teran loĝejon. Ĉu dum belegaj tagoj, kiam tiu mirinda lazuro brilas super niaj kapoj, ĉu dum silentaj noktoj, kiam trembrilantaj steloj disjetas tra spaco sian lumon, ni fortege sentas la bezonon, scii kaj tute kompreni la ordon kaj la leĝojn de senlima universo.

Poetoj de antikveco kaj eĉ de nuntempo opiniis, ke fabeloj estas pli belaj ol la realajo, ili tamen eraris. „Kiam oni scias kompreni la sciencon, diris fama matematikisto Eüler, la vera naturo estas multege pli bela ol ĉiuj fabeloj aŭ ĉiuj kreitajoj homaj".

Estas ja facile tion kompreni. Nia vido, limigita de sfero, sur kiu ni estas, montras al ni, super niaj kapoj, kupolon bluan, trapikitan de multaj brilaj punktoj. Dum la unuaj jaroj de nia juneco, rezonante laŭ sola impreso de niaj sentoj, ni kredas facile, ke ĝi estas vastega kaĝo, ĉirkaŭanta nian globon. Kaj tiel ankaŭ rezonis la unuaj homoj, ĉar homaro estas individuo, kiu edukiĝas senĉese de la malforteco nescianta ĝis la rezono analizanta. Tion fine ni retrovas en ĉiuj kosmogonioj de Arianoj, Grekoj, Romanoj, kaj eĉ dum mezepoko: Tero estas surfaco plata, senfina, ĉirkaŭita, trans siaj nekonataj limoj, kaj ĉielo estas kupolo fermita.

Laŭ ŝajnajoj, oni povus kredi, ke tero estas centra punkto de universo kaj oni parolas pri tero kaj ĉielo, kiel pri du samaj objektoj, faritaj unu post alia. Se iu lunano skribus iam: „En la komenco Dio kreis ĉielon kaj lunon", oni povus demandi lin, kial li ne parolas pri tero kaj pri aliaj planedoj, kaj ĉu li ne komprenas, ke luno sola ne estas tuta mondo. Sama rimarko rilatus al tero, kaj sciigus ke rezono estis donita al ni, por ke ni malfidu al ŝajnajoj.

Do tero estis fiksa kaj senmova, malsupre de mondo, pli longa de oriento al okcidento, ol de nordo al sudo; plie, ĉiu popolo vante estis konvinkita, ke ĝi estas sur mezo de surfaco loĝebla. Tuŝante ĝiajn limojn, unuj diris, ke oceanoj aŭ maroj ĉirkaŭas ĝin, aliaj parolis pri mallumoj miksitaj kun movo kaj ripozo; iaj monaĥoj de unuaj centjaroj certigis, ke, vojaĝinte por esploro de tera paradizo, ili estis trovintaj punkton, per kiu ĉielo kaj tero intertuŝiĝas.

Tamen iaj demandoj embarasis la scrĉantojn. La helaj fontoj de la taga lumo, luno kaj la steloj, leviĝas el la punkto kontraŭa al tiu, al kiu ili kuŝiĝas; do tiuj astroj trairas sub tero: nu, oni kredis, ke tero etendiĝas senlime sub ĝia suprajo: ĉu en ĝi estus truoj, per kiuj trapasas la astroj? Sendube, tiele oni unue opiniis. Sed neniam ili leviĝas kaj kuŝiĝas je sama punkto. Ĉu do tero ne estas senfina? Tiam, kiam oni ekklarigis, ke tero estas nur grandega sfero soligita en spaco, kleraj homoj rifuzis akcepti la senfinecon de spaco kaj tiun simplan ideon. „Ĉu oni povas esti tiel idiota, diras Laktanco, por certigi, ke ekzistas, homoj kies piedoj staras pli alte ol la kapo, ke estas landoj, kie ĉio estas returnita, kie fruktoj pendas alte, kie neĝo kaj hajlo falas de malalte alten?"

Tiu citajo estas sufiĉa, por klarigi la spritecon de teoriistoj, ŝuldita precipe al epokoj dum kiuj ili vivis, kaj kie la fruktodonaj metodoj de eksperimenta scienco ne estis ankoraŭ konataj.

Por havi veran ideon pri ĉielo, estas necese, ke ni havu precizan ideon pri tera sfero, kaj ke ni imagu tiun globon trairanta tra la spacon sen ia subportilo, kiel sapveziketo. Kaj eĉ ĝi estas pli izoligita ol tiu sapveziketo, kiu staras vere sur tavoloj de aro pli dikaj ol ĝi, dum tero staras sur nenia fluidajo, sur nenia tavolo, kaj estas sendependa je kia ajn apogpunkto.

La unua kontraŭparolo farita kontraŭ tiu diro estas jena: kial do ĝi ne falas malalten? Tiu esprimo malalten estas tute rilata. Imagante la sferon teran soligitan en spaco ni rapide konvinkiĝos, ke en universo estas nenia malalto aŭ alto. Ni marŝas sur tiu globo kiel formiko marŝas sur sfero granda kiel domo; tiu globo estas kvazaŭ magneta kaj ĝia altiro fiksas nin fortege sur ĝia surfaco. Kia ajn estas la punkto, sur kiu ni estas, ni nomos malalto la surfacon, kiu estas sub niaj piedoj, kaj alto, la spacon, kiu estas super niaj kapoj. Du observantoj starantaj sur la ekstrempunktoj de sama diametro havas altojn kontraŭajn, du aliaj sur diametro perpendikulara al unua, havas altojn perpendikularajn al la unuaj, k. t. p. (Fino sekvos)

*) El tre interesa kaj rekomendinda broŝuro „Vidajoj de Senlimo" orig. verk. de prof. Marcel Finot. Vidu. „Bibliografion".

Pri Centra Esperanta Organizo.

En la lasta tempo oni komencis multe diskuti en la gazetaro pri organizo de la esperantista reprezentantaro. La temo efektive estas tre interesa kaj ankaŭ tre grava kaj oni tute ne devas miri, ke pri ĝi ekzistas diversaj opinioj.

Tute sendepende de ia ajn oficiala projekto ŝajnas al ni, ke en la cerboj de diversaj esperantistoj devis naskiĝi memstare ideo, ke tiu reprezentantaro je multaj vidpunktoj estus tre dezirinda por ni esperantistoj. Tia ideo en la cerbo de ĉiu pensanta kaj deziranta bonon kaj ordon esperantisto devis nepre aperi, ĉar la hodiaŭa stato de nia afero ne povas kontentigi ĉiujn bezonojn. Dum dudekkelkjara ekzistado Esperanto tiel disvastiĝis kaj tiel forte enradikiĝis en diversaj sferoj sociaj, ke tute ne povas sufiĉi hodiaŭ tio, kio sufiĉis antaŭ la epoko de niaj kongresoj, kiam ni mem ne sciis, kiel multaj ni estas kaj kiel forte staras nia afero. De tia tempo la vivo mem montris, ke ordigo kaj centrigo de niaj fortoj estas ne nur dezirinda sed ankaŭ necesa. Dank'al la energio de kelkaj samideanoj naskiĝis grava Universala Esperanta Asocio, kies rapida disvolviĝo plej bone montris ĝian neceson. Dum la lastaj jaroj estis ankaŭ regulita nia oficiala instituciola lingva komitato. Sed tiuj ĉi du organizoj tute ne sufiĉas por la hodiaŭa tempo: ili havas tro specialan karakteron por ĉirkaŭpreni la tutan vivon de la esperantistaro.

La ekzistanta krom ili konstanta komitato de la kongresoj havas ankoraŭ pli mallarĝan rondon de agado. La Centra Oficejo, subtenata dank'al privataj monoferoj, ĝis nun ne povas havi ian oficialan karakteron. Ĝia laboro sen forta bazo povas nur esti dumtempa kaj limigita.

Sed ĉu ĉiuj kune suprenomitaj organizoj ne sufiĉas por ĉiuj bezonoj de la esperantista vivo? Al tiu ĉi demando ni povas respondi nee.

Antaŭ ol argumenti nian nean opinion pri tio, ni klarigos, kion ni pensas pri organizo de la esperantistoj.

Laŭ ni, ia ajn aro por bone disvolviĝi kaj prosperi nepre devas havi ian centran organizon, kiu gvidus ĝian vivon, gardus ĝian ekzistadon, zorgus pri materiala prospero kaj reprezentus ĝin en la rilatoj kun aliaj socioj.

Alivorte ni devus havi ian centran reprezentan komitaton konsistantan el pli agemaj kaj influaj esperantistoj, kiu posedus sufiĉe da materiala fonto necesa por subteno de normala evolucio de la esperanta afero. Sub la esprimo de „esperanta afero" ni komprenas nur propagandon de nia lingvo en la mondo.

Ĉu la ekzistantaj esperantistaj institucioj respondas al tiuj ĉi necesaj postuloj kaj ĉu ili povas ilin dece plenumi en la nunaj kondiĉoj de sia ekzistado? Ŝajnas al ni la respondo estas tute klara kaj ke ĝi devas esti nea.

Antaŭ ĉio nenia el la ekzistantaj organizoj posedas sufiĉe da mono por plenumi siajn necesajn taskojn, due nenia el ili reprezentas efektive la opinion de la tuta esperantistaro.

Se la Lingva Komitato, kiel institucio teoria kaj scienca ne reprezentas efektive kaj precize la opinion de la tuta Esperantistaro, tio ne estas grava, ĉar scienca institucio antaŭ ĉio postulas specialan kompetentecon de siaj anoj. Se unu aŭ alia nacio havas en ĝi pli da reprezentantoj ol aliaj, tio tute ne influas la ĉefan aferon — gardon de la lingvo. Sed en ia organizo, kiu devas ĉirkaŭpreni ĉiujn landojn kaj en ili disvolvi sian agadon, nepre devas trovi sin reprezentantoj de ĉiuj landoj kaj societoj. Neniam Angloj aŭ Francoj povas scii, kiel agi, ekzemple, en Rusujo, Turkujo aŭ alie, — nur enlandanoj povas en sia lando disvolvi la konvenan energion kaj agadon. Tamen povas okazi, ke tiuj ĉi enlandanoj malgraŭ tuta preteco, oferemeco de sia flanko, estas limigitaj en sia energio pro manko de materiala helpo. En tiaj okazoj devas ekzisti ĉe la centra organizo mona fonto el kiu oni ĉiuokaze povas ĉerpi por propagandaj celoj. Hodiaŭ bedaŭrinde pro manko de tia organizo multaj landoj malgraŭ agemeco de siaj unuaj pioniroj ne povas eliri el la embria stato, ĉar ne ĉiam agemeco iras pare kun riĉeco, kiu nepre devas ĝin subteni.

La adeptoj de Universala Esperanta Asocio diras, ke estas tute superflua tia organizo, ke U. E. A. tute sufiĉas por tia celo. Ni ne povas konsenti kun la opinioj de neanoj, ĉar unue laŭ ni U. E. A. ne reprezentas la tutan esperantistaron kaj due ĝi havas jam specialan kompetentecon — nome enkondukon de Esperanto en la praktikan vivon. Tiu tasko estas tiel granda kaj grava, ke se U. E. A. ĝis nun ne ekzistus, oni nepre devus ĝin krei. La neanoj diras, ke oni povas transformi la nunan asocion kaj donijal ĝi pli larĝan kompetentecon. Sed tio ĉi egalus kreadon de io tute nova. Kaj kiacele ĝin fari? Por mortigi

tion, kioj am ekzistas kaj bone prosperas? Ĉu ne estas pli bone krei apud U. E. A. novan organizon, kiu kontentigus ĉion hodiaŭ necesan! Ĉu tiuj du aŭ eĉ pli similaj asocioj mortigus nun la alian? Ĉu ili ne povus ekzisti samtempe kaj sin subteni amike reciproke. La rondo de nia nuna kaj estonta agado estas tiel granda, ke ne nur ni ne devas malpliigi niajn specialajn asocioju, sed kontraŭe pli nombrigi ilin.

Kio koncernas nian Centran Oficejon, ni havis impreson, ke ĝia ĝisnuna ekzistado estas nur efemera. Malgraŭ tre laŭdinda iniciato kaj mirinda persisteco kaj energio de kelkaj tre ŝatataj samideanoj, ĝi ne povas esti daŭra ĉar ĝia ekzisto bedaŭrinde dependas de oferemeco de nemultaj privataj personoj. Por tio kion jam al la esperanta afero faris la Centra Oficejo, ĉiu senpartia esperantisto nepre devas esprimi profundan dankon. Eble la formo de ĝia agado kaj diversaj detaloj ne plaĉis al kelkaj, sed tio povas al neniu doni rajton nuligi la grandan meriton de ĝiaj reprezentantoj. Cetere C. O. neniam uzurpis al si rajton esti oficiala institucio de ĉiuj esperantistoj, ĝi estis nur oficejo de la oficiala konstanta komitato kaj sur tiu ĉi posteno ĝi dum multaj jaroj dece gvidis niajn komunajn aferojn.

Tamen en siaj nunaj kondiĉoj ĝi eble ne longe povas daŭrigi sian ekzistadon. Por doni al ĝi viveblecon oni devus ĝin tute transformi t. e. trakrei ĝin en fortan rimedhavantan organizon. Laŭ nia opinio ĝia ĝisnuna rolo, kiel oficejo de la konstanta komitato de la kongresoj, estas tro limigita kaj ĝi sola povas esti transformita en la Centran Organizan Institucion, kiu havus devon ne nur aranĝi propagandajn universalajn kongresojn, sed ankaŭ gvidi la propagandon de nia afero en la tuta mondo, subteni ĝin kaj havi reprezentantojn en rilatoj kun eksteresperanta mondo.

La temo, kiel ni vidas en la raporto pri la sepa kongreso estis detale diskutita kaj oni ekceptis decidon organizi ion similan. Tiun ĉi temon devas studi speciala komisio kaj ĝin prezenti al la sekvanta kongreso por difinitiva akcepto.

La demando pri la organizo de Centra Oficejo estas tiel grava, ke ni supozas, ke en la diskutado pri ĝi partoprenos plejmulto de samideanoj. Ĝia solvo ne estas facila, des pli, ke jam nun aperis voĉoj principe kontraŭaj al la simila organizo. Ni tamen esperas, ke ĉiuj malkomprenoj malaperos kaj ke oni trovos vojon akcepteblan de ĉiuj esperantistoj. Ĉar ankoraŭ hodiaŭ la afero estas en stato de naskiĝo kaj estus tre interese tiun ĉi temon plej vaste pridiskuti, ni tre volonte oferos lokon en nia organo al tiu ĉi demando. Kompreneble ni forlasas al ni rajton elekti nur tiujn diskutojn, kiujn serioze traktos la aferon kaj efektive donos ian utilon al nia komuna afero. Se la alsenditaj projektoj estos diskutindaj ni post ilia publikigo rezumos ilin kaj kiel apartan projekton de niaj legantoj prezentos al la oficiala diskutado dum la venonta kongreso.

Rimarko. Al personoj, kiuj interesiĝas pri la temo kaj la diskutoj pri ĝi dum la VII-a kongreso, ni povas rekomendi interalie la Oficialan Gazeton Nr. 34 kaj 37.

„*P. E.*"

Uchwała kongresu ras.

Doniosły sukces Esperata.

Tylko co opuściło prasę sprawozdanie z kongresu ras, jaki się odbył w Londynie w sierpniu roku ubiegłego. Znajdujemy tam między innemi rezolucję przyjętą przez uczestników kongresu w stosunku do sprawy języka międzynarodowego, przedstawionej w referacie D-ra L. Zamenhofa (patrz. art. „Nienawiści plemienne".

Oto treść tej rezolucji: „Pierwszy międzynarodowy kongres ras, mający na celu zbliżenie różnych narodów i ras świata na gruncie wzajemnego zrozumienia się i poważania, uznaje, że pierwszym i absolutnym ku temu warunkiem jest, aby narody obok swoich języków ojczystych posiadali drugi język neutralny i wspólny dla wszystkich, język w którym mogłoby się wyrazić indywidualność duchową narodu i któryby był jakby lustrem sumienia wszechludzkiego; ponieważ kongres ras jest zdania, że taki język nie jest jedynie projektem lecz niezaprzeczalnym faktem, dlatego że Esperantem posługują się ludzie wszystkich sfer na całym świecie,— kongres wyraża życzenie, aby jego członkowie uczyli się i propagowali międzynarodowy język Esperanto, aby tworzyli w swoich sferach i krajach grupy i towarzystwa esperanckie, aby żądali od swych rządów wprowadzenia Esperanta do szkół. — Sapienti sat!

I-a Cirkulero (oficiale komunikita). Decembro 1911.

VIII Universala Kongreso Esperantista en Krakovo.

11—18 de Aŭgusto 1912.

La propono de K. K. K. aranĝi la jubilean Kongreson en Krakovo estis — laŭ raporto de „Lingvo Internacia" — akceptita de la Antverpena kongresanaro „per krioj, huraoj kaj aplaŭdoj". Jen pruvo, kun kia simpatio la tutmonda esperantistaro rilatas Polujon, lulilon de Esperanto. Oni ĝenerale komprenis, ke justeco postulas rezervi al poloj la honoron

La ĉefa zorgo de la Komitato estas scii kiel eble plej baldaŭ la proksimuman nombron de kongresanoj. **Pro tio ni insiste petas** ĉiujn esperantistojn, kiuj havas intencon ĉeesti la jubilean kongreson, **ke ili senprokraste sciigu al ni** per simpla poŝtkarto sian nomon, profesion kaj detalan adreson. Tia avizo **Suldigas ilin al nenio** kaj tamen ekstreme plifaciligas al



Krakovo. Pola nacia Muzeo „Sukiennice".

gastakcepti sur ilia tero samideanojn, dezirantajn soleni grandan internacian Feston — la 25-jaran jubileon de Esporanto. Oni do elektis Krakovon, la spiritan metropolon de Pollando.

Nur en Novembro 1911 estis elektitaj membroj de K. K. K. por la Oka Kongreso kaj pro tio oni ne povis pli frue, ol en la citita monato starigi oficiale la Lokan Organizan Komitaton, kiu, forlasinte la ĝisnunan, neaplikeblan por ĉiam tradicion, decidis ne formi „Okon" por la „Oka", sed kooptadi tiom da anoj, kiom postulas la bezono. Nuntempe ĝi konsistas el jenaj personoj: Univ. prof. Odo Bujwid—prezidanto, d-ro Stefan Mikołajski—I vicprezidanto, s-o Stanisław Rudnicki—II vicprezidanto, d-ro Leon Rosenstock—generala sekretario, d-ro Henryk Tislovitz—kasisto, s-oj Wład. Grabowski kaj Mieczysław Żielenkiewicz.

ni la laboron, permesante starigi provizoran budĝeton.

Por diskonigi la sidejon de la Oka, ni eldonis luksan, riĉe ilustritan gvidlibron tra Krakovo, kiu estas dissendata senpage al ĉiuj esp. grupoj, gazetoj kaj partoprenintoj en la Antverpena Kongreso. Aliaj personoj povas ricevi ĝin kontraŭ 2 respondkuponoj (en Rusujo kontraŭ du 10-kopekaj markoj) sendotaj al la Komitato, kies adreso estas: VIII Universala Kongreso Esperantista en Krakovo, Aŭstrio-Galicio. **Ĝenerale ĉiuj korespondajoj, rilatantaj la Kongreson estu sendataj nun laŭ la suprecitita adreso.**

La Komitato preparas eldonon de kongresaj poŝtkartoj, sigelmarkoj kaj krakovaj vidajkartoj kun esperantaj surskriboj. La aluditaj eldonajoj estos baldaŭ pretaj.

Dum la kongresa semajno estos prezentita kortuŝanta tragedio de pola poeto Juljusz Słowacki „Mazepa", en majstra traduko de s-o Antoni Grabowski. La libron eldonis la konata firmo Hachette kaj K-io en Parizo (prezo 2 fr.). La teatrajon ludos la plej eminentaj aktoroj de krakova Urba Teatro.

Inter la okazontaj festoj ni citu antaŭ ĉio la Jubilean Festvesperon, aranĝotan je honoro de nia Majstro kaj lia granda verko. La Komitato sukcesis varbi por la festo eminentajn artistojn, dank' al kiuj la programo espereble staros sur alta nivelo.

Projektata estas ekskurso al la fame konataj salminejoj en Wieliczka, kiuj estas tiel impona naturmiraklo, ke vere malfacile estus trovi ion similan en la tuta mondo.

La tradicia literatura konkurso ankaŭ ne mankos dum la Oka.

La organizon de la konkurso prenis sur sin „Pola Esperantisto", al kies redakcio (Varsovio, str. Włodzimierska 8) oni direktu ĉiujn informpetojn, rilatantajn ĉi-tiun fakon.

Pli detalajn informojn niaj legantoj trovos en la II-a cirkulero de Kongresa Organiza Komitato.

Dum la Kongreso okazos specialaj di-servoj por katolikoj kaj protestantoj. Ĉe katolika di-servo *predikos en Esperanto Lia Episkopa Moŝto pastro Bandurski*, unu el la plej eminentaj polaj oratoroj, vera pola Demosteno.

La aranĝon de ekspozicio la Komitato konfidis al „Teknikista grupo de Esperantistoj" en Lvovo, kiu jam de longe kolektas por tiu celo esperantajojn kaj sukcesis amasigi riĉan materialon. Dezirante, ke la jubilea ekspozicio fidele reproduktu la 25-jaran disvolviĝon de nia lingvo, *ni turnas nin al ĉiulandaj esperantistoj kun varma peto, ke ili helpu la ekspozician sekcion per alsendo de plej diversaj objektoj, koncernantaj Esperanton.* Ĉiu, eĉ ŝajne senvalora eksponajo estos kun danko akceptita.



Krakovo. Preĝejo de S-ta Mario.




Krakovo. Floriana turo.

Objektojn, destinitajn por la ekspozicio, oni sendu laŭ adreso: S-o Benedikto Herold, **Lvovo** (Lwów), str. Potockiego 22. Aŭstrio-Galicio.

Konvinkiĝinte, ke dum ĉiuj kongresoj la poŝta manipulado ludas gravan rolon, la Komitato klopodis certigi al si la helpon de Krakova Direkcio de poŝtoj. Tiucele ĝi turnis sin al la poŝta direktoro, kiu montriĝis tiel

favora al nia afero, ke per oficiala cirkulero li anoncis al siaj oficistoj organizon de speciala kurso por ili. Komence aliĝis al la kurso 46 personoj kaj jam post kelkaj lecionoj ilia nombro kreskis ĝis 100! Tiu fakto laŭde atestas pri la progresemo de krakova poŝtoficistaro kaj samtempe permesas esperi, ke la kongresa poŝto dum la Oka funkciados modele.

Informojn pri logado, mangado, projektata albumo kun fotografajoj de la kongresanoj balo, post-



Amat. fotogr. Jan Günther.

Krakovo. Ĉefa Poŝtoficejo.

kongresaj ekskursoj k. m. a. ni povos baldaŭ publikigi.

La Komitato esperas, ke la tutmonda esperantistaro grandare partoprenos la Okan kaj tiamaniere akcentos ĝian esceptan, jubilean karakteron.

Ankoraŭ unu fojon ni varme petas: **Avizu senprokraste vian aliĝon!**

La Loka Organiza Komitato.

Adreso: VIII Universala Kongreso Esperantista en Krakovo (Austrio-Galicio).

Opinje wybitnych francuzów o Esperancie.

P. Albert Wilm Deputowany Paryża. Jesteśmy rozbitkami w ciasnym przesmyku życiowym. Wy, którzy się urabiacie sami, przygotowujecie się przez Esperanto do ogólnego braterstwa, do solidarności względem siebie i waszych przyjaciół obcokrajowców: będzie to owocną wymianą dla stron obu.

P. Joseph Reinach, Deputowany z prow. Niższych Alp. Wiadomem jest, iż zaznaczyłem swoją sympatję dla waszych usiłowań podpisując projekt wykładów Esperanta w szkołach. Nie uczyniłbym tego, gdybym był zdania, że Esperanto (nazwijmy go, jak chcecie: językiem pomocniczym, drugim językiem), może szkodzić rozwojowi kultury francuzkiej. Odkąd powstały koleje, wzmógł się ruch turystyczny. Z chwilą jak korespondencja handlowa zacznie się posługiwać Esperantem operacje handlowe i finansowe powiększą się znacznie. Jest to teren, gdzie wasz język może oddać nieocenione usługi. Oto jest odpowiedź na zadane mi pytanie: do czego służy nauka Esperanta. Jest to potężne narzędzie dla handlu, przemysłu, turystyki.

K o n s i d e r u!

Amo elektas blinde: ĝi elektas ne edzinon sed virinon. *H. Ibsen.*

Revolucio devenas de stomako. *Napoleon.*

Geedziĝo estas realajo de amo. *Biliński.*

Ne faru ĉion, kion vi povas, ne elspezu ĉion, kion vi posedas, ne kredu al ĉio, kion vi aŭdas, kaj ne diru ĉion, kion vi scias.

El itala lingvo.

Amo al malbela virino—jen estas problemo! Ekzistasu nu estetiko, kies reguloj estas ankoraŭ esprimitaj en nenia libro„— ĝi estas la estetiko de koro.

Necese bezonataj homoj ne ekzistas; la morto pruvas al ni ĉiutage, kiom facile ŝanĝiĝas unu homa rolo per alia... *St. Miłałorski.*

Ho, ĉiu matenruĝo estu por vi kvazaŭ komenco de la vivo kaj ĉiu sun-subiro kvazaŭ la fino; ĉiu el tiuj mallongaj vivoj restigu la postsignojn de hom-ama agado por aliaj, de bona peno pri vi mem kaj de ia ajn akirita scio.

John Ruskin.

Se vi por malamo pagas per malamo, vi neniam trairos limojn de regno de malamo kaj tiu sento persekutos vin dum la tuta vivo.

Maxime de l' Inde.

Scienco kaj Vivo.

La hidrarga lago.

Antaŭnelonge en Meksiko, proksime de Vera Kruza, oni trovis en la montaro hidrargan lagon, kies borda linio egalis 5 kilometrojn kaj profundeco—5 metrojn. Nune oni jam komencis ekspluati ĉi-tiun unikan en la mondo lagon, kiu prezentas mult-milionan valoron.

La gento de pigmeoj.

Organizita de angla ornitologia societo — ekspedicio por esplor-studi Novan Gvineon, dum siaj esploroj en la valo de rivero Mimika trovis la genton de pigmeoj. Ĉi-tiu sovaĝa gento vivas en la loko alta je 610 metroj. Meza kresko de la gentanoj ne superas 1.30 metrojn. Laŭ ilia eksterajo ni povas konsideri ilin kiel negritosojn: ilia haŭto estas nigra; haroj ankaŭ nigraj kaj mallongaj.

Lastatempe similajn malmultenombrajn pigmeajn gentojn oni trovis sur Filipinaj insuloj, sur Malaja duon-insulo, Sumatro kaj ofte en Centra Afriko.

Kion oni faras el papero?

Kion oni nun ne faras el papero! En Ameriko oni faras el papero tegmentojn. En Chicago estas modaj paperaj vestoj; ili jam estas ĝenerale uzataj en hospitaloj. El papero oni ankaŭ faras cigarojn: papermaterialo estas tiucele saturata en akvo, infuzita je tabakaj detranĉajoj. Ankaŭ oni faras el papero botelojn kaj sakojn. Paperaj hufumoj estas ĝenerale uzataj. Ili estas malpezaj, pli malmolaj ol fero kaj ne vundas ĉevalojn (ili estas algluataj al hufo). El papero oni ankaŭ konstruas aŭtomobilojn, pavimojn, vaporŝipojn kaj faras multajn aliajn objektojn. Nature, ke por tiaj celoj papera maso estas speciale preparita sub granda premo.

Reformo de presado.

En New-York organiziĝis kompanio, intencanta fari principan reformon en ĝisnuna presmaniero, nome, ke oni presu afiŝojn, librojn, dokumentojn k. ct. sur nigra papero. En frunto de le kompanio staras inĝeniero Albert Marechal. „Flagretadon de nigraj literoj sur blanka fono oni jam delonge juĝis, kiel tre malutila por okuloj: ĝi kaŭzas multe de okulmalsanoj ne nur ĉe maturaĝaj, sed ankaŭ ĉe infanoj", diras Marechal. Kaj, apogante sin je opinio de multaj okulistoj, li decidis fari plenan revolucion en pres-arto, uzante por presado ne blankan sed nigran paperon. Li nur ne povis solvi la demandon per kia kolorilo presi sur la nigra fono — ĉu per blanka aŭ alikolora? Laŭ liaj instrukcioj, doktoroj faris vicon da komparaj eksperimentoj kaj plejmultavoĉe venis al konkludo, ke flava kolorilo estas preferinda ol blanka, ĉar flava kolorilo malpli lacigas vidsenton.

M.

El Esperanta Mondo.

La Komitato de U. E. A. sekve de kongresa dezlresprimo, alprenis decidon, kiu prezentas gravan intereson por ĉiuj kolektistoj kaj interŝanĝistoj. Ĝi starigis, interne de UEA, specialan fakan asocion destinitan por la kolektistoj. Tiu fako sub la nomo *Universala Interŝanĝa Asocio*, grupigos ĉiujn personojn kiujn interesas la internacia korespondado kaj interŝanĝado. Ĝi konatigos unu al la alia per sia Bulteno, senpage sendota al ĉiuj membroj, kaj organizos specialajn servojn por la plimultigo de la korespondoj kai interŝanĝoj. Aliĝante al la fako, la kolektistoj estos garantiataj kontraŭ nerespondo per speciala regularo, kiu difinas kaj precizigas la rilatojn de la fakanoj unu kontraŭ la alia. Oni scias, ke ĝis nun la manko de tiaj garantioj estis granda malhelpo por regula korespondado inter Esperantistoj. Estas do esperinde, ke ĉiuj seriozaj Esperantistaj korespondantoj kaj kolektistoj aliĝos al la nove kreita fako, kiu pro la disvastiĝo de UEA, estos rapide konata en ĉiuj landoj. La speciala faka kotizajo estas 50 sd. jare (kun la Bulteno). Oni povas aliĝi, ĉu per la Delegitoj de UEA, ĉu senpere per la Centra Oficejo de UEA.

La **Oficiala Jarlibro** de UEA (1912) aperos en januaro. Ĝi formos volumon de 200 paĝoj da plej utila materialo kaj estos senpage sendata al ĉiuj Esperantianoj pagintaj la kotizajon por 1912. (Oficiale komunikita).

Konkurso.

La Esperanta Societo „Verda-Stelo" Hamburgo, intencas presigi poŝtkartojn kaj serĉas bonajn konvenajn skizojn.

Pro tio la subskribinto promesas premion de 5 Sm. al tiu, kiu liveros la plej bonajn desegnaĵojn. La skizoj devas havi originalan poŝtkartan grandecon kaj estos liveritaj ne post la 15 februaro 1912 al la subskribita adreso. Ne uzu, se eble, pli ol 2 kolorojn por la desegnaĵo; povas esti ankaŭ fotografaĵo. Ĉiujn detalojn oni vidas en la precizaj kondiĉoj, haveblaj kontraŭ respondkupono de Alfred Schoene, Hamburg 23, Wandsbecker Chaussée, 42.

Esperantista muzeo kaj biblioteko.

Se oni vizitas la saksan ĉefurbon kaj alproksimiĝas al la rivero Elbe kaj al la fame konata teraso de la grafo Brühl, oni vidas tie belan grandan konstruaĵon, konstruitan de la lerta artisto Wallot: la parlamentejon. En tiu ĉi konstruaĵo en la unua etaĝo troviĝas la Esperantista muzeo kaj biblioteko, apartenanta al la saksa ŝtato. Feraj bretaroj en altega ĉambrego salutas la eniranton; bustoj, bildoj, reklamiloj k. t. p. ĉie sur tabloj, kolonoj kaj muroj. Granda jam estas la nombro de la libroj pri internacia lingvo. Nenio mirinda, ke ne nur Dresdenaj samideanoj vizitas kaj uzas la bibliotekon, sed ankaŭ multaj aliaj germanoj el aliaj urboj kaj eĉ negermanoj, eĉ registaroj, kiuj volas sin informi pri Esperanto, skribas al tiu ĉi reĝa biblioteko por ricevi literaturon kaj informojn; reĝa bibliotekisto estas devigata respondi kaj plenumi la petojn. Certe tio tre grava institucio por tuta Esperantujo! Ni Esperantistoj devas apogi ĝin ĉiamaniere.

Do, se Vi havas ion superflan, ne forjetu ĝin, ankaŭ se ĝi eĉ estas nur esperantista regularo aŭ propagandilo, sed sendu ĝin al tiu ĉi muzeo, por ke tiu ĉi reĝa kolekto fariĝu honora monumento de nia movado! Ĉion oni sendu sub la adreso: Reĝa biblioteko, Dresden, Standehaus, I. etaĝo, ĉambro 83.

La cifera muziko.

Ĵus fondiĝis en Parizo filantropa Societo, sub la nomo de „L'Euterpe", kies celo estas precipe propagandi la studon de la muziko kaj la metodon de la cifera muziko, simpligita kaj plenigita de Arthur Maquaire, komponisto, tenor-solisto ĉe la koncertoj „Colonne".

Rimarkinda estas fakto, ke en tiu ĉi metodo Esperanto estas alprenita, por la indiko de la movoj kaj nuancoj.

La Societo eldonas tre interesan francan bultenon, kies senpaga specimeno estos sendata al ĉiuj petantoj. Adreso: „L'Euterpe", 71 rue du Cherche-Midi, Paris.

El „La Movado".

Fakty.

Esperanto w szkołach.

Na mocy pozwolenia Hiszpańskiego Ministerjum Oświaty publicznej, wykłady jęz. Esperanto wprowadzono jako przedmiot fakultatywny do nast. uczelni w Madrycie: Centralnego Uniwersytetu, Instytutu Ś-go Izydora, Normalnych Szkół nauczycieli i nauczycielek, Wyższej szkoły nauczycieli, Narodowej szkoły języków, Wyższej szkoły handlowej, Ateneum Madryckiego, Centrum młodzieży madryckiej, Szkoły policji.

W roku 1912 otwarte będą kursy w Uniwersytecie Saragossa, w Instytutach w Pamplono, Ternelo, Matono (Wyspy Balearskie), Valladolido, Zamoro i we wszystkich szkołach, normalnych dla nauczycielstwa.

Król włoski i Esperanto.

Znakomity esperacki prelegent E. Privat, którego po powrocie z odczytów wygłoszonych w Moskwie usłyszymy w Warszawie, podczas pobytu we Włoszech uzyskał półgodzinną audjencję u króla Wiktora Emanuela. Król, bardzo życzliwie usposobiony dla sprawy esperanckiej, przeczytał w obecności p. Privat kilka stron tekstu esperanckiego prosząc o poprawianie wymowy, przeglądał słownik Esperanta i dziwił się niezwykłej łatwości i międzynarodowości pierwiastków języka Esperanto.

Sympatja Króla Włoskiego dla naszej sprawy może oddać nieocenione usługi rozwojowi Esperanta we Włoszech — i dlatego też należy życzyć p. Privat, aby gwiazda Esperancka otwierała mu nadal podwoje pałaców królewskich, a jego niezwykła elokwencja jednała mu koronowanych przyjaciół.

Hojny dar.

12-go grudnia na zwykłej miesięcznej kolacji Paryskiego Tow. esperanckiego, wobec licznie zebranych esperantystów i znakomitych gości, między którymi byli obecni: Senator Reymond, deputowany Breton, Gilo Bailloud, hr. Montebello, pp. Archdeacon, Barthelot, Farman, Lefevre — znakomity przemysłowiec francuski p. Michelin ofiarował sumę 20,000 franków na nagrody dla młodzieży szkół francuskich uczącej się Esperanta. Naturalnie, hojny ten dar wywołał entuzjazm zgromadzonych.

Kroniko.

Francja.

Lille. Rada miejska obstalowała 100 egz. doskonałego podręcznika Esperanta: „L'Esperanto à l'Ecole".

Louviers. Zorganizowano Kursy Esperanta w Domu Miejskim.

Le Mans. Miejscowe Tow. Esp. otrzymało złoty medal za udział w miejskiej wystawie, na której gabloty esperanckie budziły wielki podziw publiczności.

Firminy. Rada miejska wyznaczyła 20 Sm. zapomogi dla Tow. Esp. w tym mieście.

Belgja.

Charleroi. Na Kursy Esperanta uczęszcza 116 uczniów.

Antwerpja. Funkcjonują tu liczne Kursy Esperanta. Ogółem uczęszcza 350 uczniów. Otwarto także kursy dla policji portowej.

Hiszpanja.

Barcelona. Z górą 20 istniejących tu towarzystw esperanckich rozwija niezwykle energiczną działalność propagacyjną.

W gazetach: Las Noticas, La Publicidad, El Pobla Catala, La Actualidad i Diaro del Comercio — ukazały się sympatyczne artykuły o Esperancie.

W kilku Towarzystwach — kursy języka.

Seville. Komisja budżetowa wniosła do projektu budżetu na 1912 rok. 1,500 pesetów na subsydjum dla miejscowego Tow. Esperantystów.

Niemcy.

Schöneberg. Kursy jęz. Esperanto są prowadzone w gmachu Zarządu Policji. Rząd asygnował 500 mk. na premje dla policjantów-Esperantystów.

Augsburg. Esperanto jest wykładany policjantom na koszt rządu.

Otwarto kurs dla urzędników pocztowych.

Czechy.

Godnym zanotowania jest fakt, że znany „Klucz Esperanta (Ĉeĥeĉ'a) rozszedł się w Czechach w 50,000 egzemplarzy!

Samos.

Ogółem w roku 1911 uczęszczało na kursy Esperanta 1043 uczniów.

POLA KRONIKO.

Varsovio.

La 4-an de Januaro okazio en „Uranja" — monata kunveno de varsoviaj samideanoj.

D-ro Ignacy Dubrowicz havis lecionon de Esperanto kaj diris kelkajn vortojn pri utileco de nia lingvo. Lia prelegeto tute meritis la bruajn aplaŭdojn per kiuj la publiko dankis al li.

Prezidanto, s-o A. Grabowski, legis l-an cirkuleron pri krakova kongreso.

S-oj A. Grabowski kaj M. Czerwiński deklamis belegajn kaj impresajn fragmentojn el „Halka" kaj „Mazepa"—kiuj jam aperis en eldono de firmo Hachette & C-o en Parizo.

La kunvenon ĉeestis du gastoj, nome s-ro Szabuniewicz el Moskvo kaj s-o Mędrkiewicz el Krakovo. Ili ambaŭ salutis Polan Societon en la nomo de siaj societoj.

Bruajn aplaŭdojn elvokis saluto de s-o Szabuniewicz, kiu interalie diris, ke en Moskva societo dum kunvenoj oni parolas nur Esperante.

Krakovo.

Oni povas vere diri, ke la vivo esperanta en Kraków plivigliĝis nune, en antaŭkongresa tempo. grandege. Loka preso enmetas tre volonte notojn kaj pli grandajn artikolojn pri Esperanto; precipe favoraj estas por ni „Tygodnik mieszczański", „Goniec poniedzialkowy" kaj „Głos narodu". Du unuaj enhavas en ĉiu sia numero longajn propagandajn artikolojn. La kursoj de la lingvo multenombre frekventataj, estas aranĝitaj en „Societo Esperanto" kie estas samtempe du; pli supra, kondukas S-o Mędrkiewicz kaj duan komencan — gvidas S-o D-ro Tislowitz. Nune oni aranĝis senpagan kurson por gimnazia junularo; dum kelkaj tagoj enskribiĝis ĉirkaŭ 50 studentoj. Tiun kurson kondukos S-o Kriss, same kiel la kurson por akademia gejunularo. Krom tio oni aranĝas la kursojn en „Czytelnia katolicka", „Gremium handlowców" kaj „Stowarzyszenie kupców". Plivigliĝis ankaŭ la movado en la societejo. Kutimaj mardaj kunvenoj arigas pli grandan personaron; dum la kunvenoj oni prelegas, legas, kantas, babilas, dancas. El pli gravaj pridiskutitaj temoj oni devas citi la jenajn: S-o L. Kronenberg parolis pri „Polaj radikoj en Esperanto", S-o St. Rudnicki pri „Esperanto en Bohemujo", S-o Mędrkiewicz pri aranĝota koncertvespero, F-ino Z. Kronenberg legis kelkajn ĉapistrojn el tradukata de ŝi „Quo vadis" de Sienkiewicz kaj deklamis sian

tradukajon „Antaŭ la juĝisto" de M. Konopnicka, S-ro Rudnicki raportis pri galicia kongreso esperantista, okazinta en Leopolo, S-ro Kriss deklamis sian originalan versajon en Esperanto „Nokta revo", kaj fine S-ro L. Kronenberg parolis pri „Humorajoj" de Lengyel. *L. Kronenberg.*

Zawiercie

Loka Societo esperantista aranĝis du kursojn de la lingvo, pri kio anoncis al publiko grandegaj afiŝoj eldonitaj de la energia societo.

Lublin.

En antaŭurbo Sławinek, sur teritorio de bieno de ges. Mędrkiewicz — oni aranĝis someran restejon „Somera Lublino"; unu el kelkaj stratoj de tiu ĉi vasta somera kolonio portas nomon „Strato de Ludwik Zamenhof".

Korekto.

Kiel Varsovia regiona delegito de U. E. A. estas elektita *s-o Wład. Hirszowski* (Erywańska Nr. 2)—ne s-o Jabłkowski, kiel ni erare skribis en nia decembra n-ro.

Z prasy polskiej.

W *Kurjerze Warszawskim* i *Kurjerze Polskim* zamieszczono artykuły o librecie opery „Halka" tłómaczonym na język Esperanto przez mistrza poezji esperanckiej, tłómacza „Mazepy", „ W Szwajcarji" i innych pism Słowackiego — p. Antoniego Grabowskiego.

— Krakowski „*Tygodnik Mieszczański*" — stale umieszcza artykuły o Esperancie i przyszłym kongresie w Krakowie.

„W sprawie nauki języków obcych". Napisał Zygmut Gryff; skład główny u Gebethnera i Wolffa; cena 15 kop.

Doskonała ta i pięknie napisana broszura zasługuje na jaknajszersze rozpowszechnienie i powinna znaleść się w ręku każdego polskiego propagatora naszej sprawy.

Bibliografio.

Andrzej Niemojewski. Legendoj kun permeso de la autoro al la pola lingvo tradukis Br. Kuhl. Centra Eldonejo por Esperanto kaj Stenografio, Magdeburg, Kaiser Friedrichstr. 1. 1 vol. 231 paĝo prezo

Br. Kuhl havis tre bonan ideon alproprigante al la esperanta literaturo la „Legendojn" de A. Niemojewski. La temo pritraktata en tiu ĉi altvalora literatura verko rilatas la vivon de Jezuo. La formo en kiu tiuj ĉi poeziaj rakontoj reproduktas la antikvan epokon de la unuaj kristanaj tempoj rememorigas al ni antikvajn legendojn. La aŭtoro, kiu estas konata en Polujo kaj ankaŭ en eksterlando kiel eminenta poeto, literaturisto kaj sciencisto en la lasta tempo oferis sin speciale al la traktado de religiaj temoj kaj precipe de la studado de evangelioj. Oni povas disputi kun li pri la rezultatoj kaj konkludoj de lia esplorado, sed oni devas konsenti, ke ĉio, kion li prilaboris kaj jam esploritan publikigis, posedas tre grandan sciencan valoron kaj meritas plej larĝan disvastigon inter legantoj. La kolekto de la „Legendoj" ne apartenas al la verkoj sciencaj sed tamen ĝi povas esti konsiderata kiel poezie-historia verko, en kiu laŭ eblo, la aŭtoro respegulis ĉion, kion rilatas al tiuj tempoj koncernaj okazintaĵoj.

La traduko estas tre bona, simplestila kaj bonege reproduktas la ĉarmon de la originalo.

L. D.

Aŭgust Ŝenoa La Trezoro de l' Orajisto. Zlatarovo Zlato. Kun portreto de l' aŭtoro. El kroata lingvo tradukis Fran Kolar Krom. Prezo 1 Sm. Propra eldono. Zagreb 1911. Nakladna Tiskara Antuna Scholza. Gajeva ulica 7. Paĝoj X+290.

La bele edonita dika libro prezentas al ni en esperanta traduko historian romanon de la kroata poeto kaj romanverkisto Ŝenoa, pri kies vivo kaj verkoj sciigas nin la tradukinto en la antaŭparolo. Ŝenoa apartenas alla plej eminentaj aŭtoroj de Kroatujo kaj liaj verkoj estas tradukitaj en diversajn lingvojn. Tiel ekzemple en lingvo pola aperis siatempe la romano „Trezoro de l' Orajisto" (Złota Dzieweczka) kaj kelkaj aliaj rakontoj kaj noveloj, kiel „Senjana mano" (Seńska ręka) „La dianto el la poeta tombo (Gwoździki z grobu poety) kaj aliaj.

La „Trezoro de l' Orajisto" estas rakonto el la XVI jarcento. En ĝi la aŭtoro prezentas, kiel la bravaj zagrebaj burĝoj devis defendi siajn privilegiojn kontraŭ la arbitraj kaj fieraj najbaraj magnatoj, kaj li rakontas al ni pri la malfeliĉa amo de juna aristokratido al bela burĝofilino, kiu senkulpe pereas el manoj de krimuloj.

Kvankam la aŭtoro en la rakonto ne vidigas la kapablecon potence impresi la animon de la leganto kaj streĉi lian sciemon, la romano povas esti legata kun utilo kiel interesaj

paĝoj el la malmulte konata historio de la brava Kroatujo, kiu same kiel Polujo estis unu el fortikaĵaj muroj de l' kristaneco kontraŭ la barbareco de turkoj kaj tataroj.

Bedaŭrinde la traduko ne povas esti nomata korekta. La tradukinto esperantigis multajn naciajn idiotismojn tute laŭvorte, ne atentante tion, ke ilia senco estos nekomprenebla por alilandanoj. Kiu divenos ekzemple la sencon en la frazo: „Tie kuŝas la leporo". Eble nur tiu, kiu konas la lingvon germanan, kiu havas analogian frazon: „Da liegt der Hund begraben" (Tie kuŝas la enterigita hundo), nur tiu konjektos, ke li devus ĝuste legi „Tio estas la kaŝita motivo" aŭ ion similan.

Kial la tradukinto uzas obstine (li skribas ĉiam erare opstine, apsolvi) la akuzativon, kie la senco postulas la dativon kun al („Mi vin rakontos") Li faras tion eĉ kiam renkontiĝas du akuzativoj („Li alskribas vin tion"). Kial li forlasas la akuzativon konstante kiam la adjektivo sekvas la substantivon? (Li metis kruĉon plena da vino"). Kial li uzas akuzativon post „al"? („Ili iris al lian lardon") kial post jen (ekz. jen min!)? Kial li uzas „oni" senpersone (ekz. „Ve! oni sonis tra la popolo"; „Oni okazadis, ke la episkopo ordonis")? Kial li uzas imperativon dum simpla rakontado? Tiaj kaj multaj aliaj strangaĵoj kaj deflankiĝoj de la korekta stilo esperanta estas tre malagrable sentataj dum la legado, kaj ili estas ankaŭ kulpaj, ke la tutaĵo ne faras la deziratan simpatian impreson. Ni esperas, ke en estontaj eldonoj la eraroj estos korektitaj. *A. G.*

Krestomatio por infanoj kaj komencantoj. Verkita en kunlaborado de diverslandaj esperantistoj sub redaktado de Romano Frenkel. Kajero unua. Prezo 0,20 Sm. Bucureşti, Editura Esperanto. J. C. Bratianu 5. Paĝ. 34 Kolekto de Danubo.

Kiel diras la titolo, la broŝuro estas la komenco de granda infana Krestomatio-Biblioteko, kiun s-ro R. Frenkel intencas daŭrigi per pluaj kajeroj, kolektante la riĉaĵojn de la infana literaturo de la tuta mondo. Jam la unua kajero prezentas belan kolekton da fabeloj, fabtoj, enigmoj, proverboj, en lertaj tradukoj de diversnaciaj kunlaborantoj. La materialo, pro senĉesa alfluo de novaj artikoloj, ne estas gradigita, sed la redaktoro promesas tion fari en dua eldono, kiu estos ornamita per ilustraĵoj. Ni deziras al tiu-ĉi simpatia entrepreno la plej bonan sukceson. *A. G.*

Vidajoj de Senilmo. Originala traktato de profesoro Marcel Finot. 10-spesdeka Biblioteko Esperantista Nr. 5-a, 1911. Esperanto-Propaganda Instituto. Leipzig. Paĝoj 24.

Tiu-ĉi majstre skribita populara prelego pri astronomio donas en tri ĉapitroj: „La ĉielo, la steloj kaj Mirindajoj de suno" koncize ĉion, kion ĉiu inteligenta homo devas nepre scii pri la universo. Post la tralego de tiu-ĉi valorplena verketo la leganto certe konsentos je la opinio, kiun prof. Finot citas laŭ la fama matematikisto Eŭler: „Kiam oni scias kompreni la sciencon, la vera naturo estas multege pli bela ol ĉiuj fabeloj aŭ ĉiuj kreitaĵoj homaj". Ni povas gratuli la aŭtoron kaj la eldoninton. *A.G.*

N. Kabanov. Samij logkij jazik Esperanto. Moskva 1912. Eldono de Posrednik Nr. 802, paĝoj 63. „Plej facila lingvo Esperanto". Jen bonega ruslingva lernolibro de Esperanto por infanoj, junuloj kaj ĉiuj komencantoj. En 12 lecionoj la tame konata aŭtoro instruas la lingvon fundamente laŭ prelega metodo, kiu povas esti ankaŭ aplikata utile dum kursoj publikaj.

E. Boirac. Vortaro de la oficialaj radikoj de Esperanto, Laŭ universala vortaro kaj unua oficiala aldono. Paris. Hachete et C-ie. Kolekto de la Revuo. Prezo fr. 0,50. pag.—28.

La libreto enhavas 3492 radikojn esperantajn. Kvankam ili aperas sen traduko en ian nacian lingvon, la radikareto estas dezirinda aldono al ĉiu nacia vortaro, ĉar ĝi permesas orientiĝi, kiuj radikoj estas jam oficiale akceptitaj. Kiel en sia Plena Vortaro prof. Boirac presigis la radikojn de la Universala Vortaro per dikaj leteroj, tiujn de la Oficiala Aldono per literoj ordinaraj. *A. G.*

Esperanto kaj Ido, laŭ G. Gautherot trad. de L. E. Meier. Esperanta Propaganda Instituto. Leipzig. Kaiser-Wilhelmstr. Nr. 15. 10 spesdeka Biblioteko Esperantista Nr. 4-a paĝ. 16. La rekomendinda libreto prezentas esperantan tradukon de la ĉapitro „Esperanto kaj Ido" el la bonega granda verko de Gustave Gautherot „La Question de la Langue Auxiliaire Internationale", kiu aperis en lingvo franca, kaj pri kiu ni siatempe pli detale raportis. La esperantistoj, kiuj ne scias la lingvon francan kaj deziras ekkoni precizan historion de tiu malsukcesinta „Ida" atenco kontraŭ Esperanto, legos tiun ĉi broŝuron kun interese. *A.G.*

La Amkonkurantoj. Triakta komedio de *Reinhold Schmidt*, Gotha, 1911. Central-Verlag für Esperanto und Stenographie. Magdeburg, Kaiser Friedrichstrasse 1. Paĝoj 46, prezo M 0.25.

S-ro Schmidt, la autoro de la grandioza historia dramo „Gustav Vaza" provas nun siajn fortojn kiel originala verkisto esperanta ankaŭ

en komedio, kaj ni konstatas kun kontentiĝo, ke li faras tion tre sukcese. Precipe en la tria akto, kiam la juna aktoro, amanto de Gertrudo, aperas en alivestiĝo kaj deklamas la majstrajn jambojn kaj sprite solvas la situacion, la manoj mem kunmetiĝas al aplaŭdo.

La stilo estas preskaŭ ĉie korekta, kvankam ne tute libera de kelkaj german-devenaj pezecoj, kiuj kaŭzas, ke ni preferas S-ron Schmidt, kiam li parolas altfluge per siaj kvinpiedaj jamboj.

Ŝajnas al ni, ke la aŭtoro uzas „konfidi" ne ĝustasence. Ekzemple anstataŭ „Mi konfidas je la sana sento de Gertrudo", ni dirus: „Mi fidas k. t. p." Ni konfidas al iu sekreton, sed fidas je la helpo de Dio. Same la aŭtoro uzas dufoje „ekvido" kie ni preferus „ekrigardo", ekz. „Kun intima ekvido al Gertrudo", ĉar „vidi" ne posedas la aktivecon de rigardi. Komapru germane „sehen" und blicken". *A. G.*

Esperanto-Gvidanto pri la publika interkomunikiĝado. Preparilo por la ekzameno pri kapableco. Laŭ Komisio de la Saksa Esperanto-Instituto, Dresdeno, originale verkita de *R. Richter*. Eldonejo-Germana Esperanto-Librejo, Leipzig, 1911, paĝoj 88, prezo Sm. 0.50.

Ke niaj bravaj germanaj samideanoj studas nian karan Esperanton tre fervore kaj konscience, tion pruvas tiu-ĉi gvidlibro de interparolado, enhavanta tre bonstile verkitan Demandaron kun respondekzemploj pri ĉiuj eblaj objektoj (Intersalutiĝo, komplimentoj, informoj pri vojoj kondukantaj al hotelo, poŝtoficejo, teatro, malsanulejo k. t. p. pri vidindajoj, transportiloj (fervojoj, vaporŝipoj, droŝkoj, omnibusoj) pri postaj, policaj kaj limdepagaj aferoj).

